

Trankvila Agado

La 14-a Ĉapitro de Saddharma-Pundarika Sutro

法華經安樂行品第十四

tradukis **Asano Sanĉi**, Japanio

Tiam Mañjuŝri-Kumarabhuto Bodhisatvo-Mahasatvo diris al la Budho, “Budho, ĉi tiuj bodhisatvoj agadis tre maloftan malfacilaĵon. Ili ĉiuj respektas elkore la Budhon, ili faris grandajn votojn jenajn, ‘Ni ĉiuj deziras protekti, reciti kaj prediki ĉi tiun sutron «Saddharma-Pundarika»’. Budho, kiamaniere Bodhisatvo-Mahasatvo povos prediki ĉi tiun sutron en venonta malbona mondo?”

La Budho diris al Mañjuŝri, “Se Bodhisatvo-Mahasatvo volus prediki ĉi tiun sutron, li devas sidiĝi en kvar darmoj.

Unue prediku ĉi tiun sutron por vivaĵoj trankvile en la loko de sia agado¹ kaj la loko de sia amikiĝo². Mañjuŝri, kio estas la loko de bodisatva agado? Se iu bodhisatvo sidus sur la tero de tolero, li estus ĝentila, ne estus surpriziĝema kaj vidinte ĉion, kiel ĝi vere estas, neniam estus kaptata de sia agado kaj ne deflankiĝus al vakeco nek al esteco, tio estas nomata la loko de bodhisatva agado.

Kio nomiĝas la loko de amikiĝo? Bodhisatvo-Mahasatvo ne amikiĝu kun reĝo, princo, ministro kaj ĉiu estro. Ne amikiĝu kun herezo, brahmaĉaro, nirgranta ĵnatiputro³, verkisto de herezaj versaĵoj aŭ prozoj kaj lokajato⁴ aŭ vama lokajato⁵. Ankaŭ ne amikiĝu kun petolaĵo, interbatiĝo kaj luktado, kaj la ludo de diversaj fantomoj, el kiuj estas Naro k.t.p. Ankaŭ ne amikiĝu kun ĉandalo, kaj homo de malbona silo, kiuj bredas apron, ŝafon, kokon, kaj hundon kaj ĉasas aŭ fiŝkaptas. Se tiaj homoj proksimiĝus al vi, prediku al ili Darmon, sed neniam deziru ilian vivadon. Mañjuŝri, kiam Bodhisatvo-Mahasatvo intervidas kontraŭ virino, tiam ne prediku la Darmon en la stato tiel, kiel li incitas seksan instinkton. Ankaŭ ne volu vidi virinon. Se Bodhisatvo-Mahasatvo enirus en alian hejmon, ne parolu kun knabino, virino, vidvino. Plie ankaŭ ne proksimiĝu kaj amikiĝu kun kvarspecaj neŭtralaj viroj. Ne eniru en alian hejmon sola. Se pro neevitebla afero

¹ loko de agado, 行處. konvinkiĝi pri vero kaj agadi laŭ la vero.

² loko de amikiĝo, 親近處. Tiu, kiu ne konvinkiĝas pri vero, ekzerciĝas la veron kaj proksimiĝas al la vero.

³ Nirgranta Ĵnatiputro, nomo de herezulo, kiu insistas ke asketismo estas la vojo por Nirvano.

⁴ Lokajato, 路伽耶陀. nomo de herezulo, kiu jesas homan avarecon laŭ bulgara opinio.

⁵ Vama lokajato, 逆路伽耶陀. Tiuj, kiuj agadis malbonon malbone uzante la doktrinon de Lokajato.

Bodhisatvo-Mahasatvo predikus Darmon por virino, ne ridu malkovrante siajn dentojn. Ne malkovru bruston. Ne amikiĝu kun virino eĉ por la Darmono. Des pli prave alia okazo. Ne vivtenu junan disĉiplon, ŝramanerakon kaj knabon. Ankaŭ ne deziru kun virino lerni sub sama instruisto. Ĉiam sidiĝu por dhjano en silenta loko kaj lernu la rimedon paciĝi la koron. Manĵuŝri, ĉi tio estas nomata la loko de amikiĝo.

Ankaŭ Bodhisatvo-Mahasatvo vidu ĉion jene: ĉio estas vakeca kaj samtempe ĝi estas tiu, kiu estas reale ekzistas: ĉio ne renversiĝas nek moviĝas nek sinretiras kaj nek turniĝas: ĉio ne havas posedecon kvazaŭ ĉielo: neniu povas esprimi ĝin: ĝi neniam naskiĝas nek aperas nek okazas: ĝi ne havas nomon nek formon nek posedecon: Ĝi ne estas tiu, kiu estas senlima kaj senbara. Ĉio ekzistas de la kaŭzo-rezulto. Pro sia renversiĝo oni vidas tion, ke ĉio estas ĉiama kaj senŝanĝa. Bodhisatvo-Mahasatvo ĉiam vidas ĉion superdirite. Ĉi tio estas nomata dua loko de amikiĝo.”

Tiam la Budho denove predikis por klarigi ĉi tiun signifon per jenaj versaĵoj:

- 1) Se iu Bodhisatvo-Mahasatvo volus prediki ĉi tiun sutron
Kun timeca koro en venonta malbona mondo,
- 2) Li devas eniri en la loĝejo de agado kaj amikiĝo.
Ne amikiĝu al reĝoj kaj princoj.
- 3) Foriru el ministro, ĉiu estro kaj minaca konkuranto,
Ĉandalo, herezulo kaj brahmaĉarino.
- 4) Ne amikiĝu al la studanto, kiu estas tro aroganta
Kaj absorbita al la instruo de Hinajano.
- 5) Ne amikiĝu kun malbonaj bikŝuoj kaj arhatoj,
Kiuj havas nur la titolon vane,
Ankaŭ kun bikŝuino, kiu tro ŝatas amuziĝon.
- 6) Ne amikiĝu kun upasakoj, kiuj estas profunde absorbitaj
Al kvin avarecoj kaj deziras estantan Nirvanon.
- 7) Se ĉi tiuj venus al bodhisatvo kun bona koro
Kaj dezirus aŭdi la vojon de Budho,
- 8) Preidku Darmon por ili kun netimeco
Absorbiĝante al nenio.
- 9) Ne proksimiĝu nek amikiĝu al vidvino,
Virgurino kaj neŭtraraj viroj.
- 10) Ne amikiĝu al tiuj, kiuj ĉiam mortigas bestojn pro gajno,
Nome tiuj, kiuj tranĉas karnon aŭ ĉasas aŭ fiŝkaptas.
- 11) Ne amikiĝu al tiuj, kiuj vendas diversajn karnojn,
Kaj ĉiuj virinoj, kiuj sin prostituas.
- 12) Ne amikiĝu al danĝera kultado.
Diversaj konkuroj kaj malĉastecaj virinoj.
- 13) Ne prediku por virino en kaŝita loko.
Okaze de prediko ne ludridu iomete.
- 14) Se vi iras en vilaĝo por almozpeti, iru kun unu bikŝuo.
Se vi iras sola, pripensu tutkore pri Budho.
- 15) Ĉi tiuj estas nomata la loko de agado aŭ amikiĝo.
Prediku trankvile sidiĝante sur ĉi tiuj du lokoj.

- 16) Ne agu en supera, meza aŭ malsupera Darmo.
Ne agu en monda aŭ supermonde darmo, kaj en vera aŭ malvera.
- 17) Ne diferencigu homojn ankaŭ
Dirante, “Ĉi tiu estas viro” aŭ “Ĉi tii estas virino,
Nenion akiru nek sciu nek vidu!
Tio estas nomata la amikiĝa loko de bodhisatvo.
- 18) Ĉio estas vakeca kaj ne posedeca.
Nenio estas konstanta nek okazas nek estingiĝas.
Tio estas nomata la amikiĝa loko de saĝulo.
- 19) Oni diferencigas ĉion pro sia renversiĝo.
Pensinte, “Ĉi tio ekzistas.” aŭ “Ĉi tio ne ekzistas.”,
“Ĉi tio estas vera.” aŭ “Ĉi tio estas malvera.”,
“Ĉi tiu vivas.” aŭ “Ĉi tiu ne vivas.”
- 20) En trankvila loko pripensu
Kiamaniere vi povas kvietigi vian propran koron?
Ne skuiĝu. Estu tiel trankvila kiel monto Sumero
- 21) Ĉio estas neposedeca kiel ĉielo. Nenio estas fiksita.
Nenio naskiĝas nek aperas nek moviĝas nek retiriĝas.
- 22) Ĉio estas eterna kaj egala.
Pripensu supredirita estas nomata la loko de amikiĝo.
- 23) Post mia forpaso, se iu bikŝuo enirinte en ĉi tiujn lokojn de agado kaj amikiĝo,
Prediku ĉi tiun sutron, li ne devas esti malforta en sia koro.
- 24) Se iu bodhisatvo enirinte en trankvilan ĉambron,
Ĉiam pripensinte Darmon per prava pensado
- 25) Kaj fininte sian pripensadon prediku kaj klarigu
Ĉi tiun sutron por reĝoj, princoj, popoloj kaj brahmanoj.
Lia koro estus trankvila kaj neniam malforta.
- 26) Manĵuŝri, tio estas nomata “Bodhisatvo sidiĝas en unua Darmo
Kaj predikas Saddharma-Pundarika-Sutron en venonta tempo.”

“Ankaŭ Manĵuŝri, se iu volus prediki ĉi tiun sutron en la tempo de fina Darmo post la forpaso de Tathagato, sidiĝu en trankvila agado. Kiam iu predikus per buŝo aŭ recitus ĉi tiun sutron, ne diru kulpon de aliaj homoj kaj sutro. Ankaŭ ne malestimu alian instruiston de Darmo. Ne diru pri la ŝatato aŭ malŝatato, supereco aŭ malsupereco de aliulo. En amaso da ŝravakoj ne diru la kulpon de iu publikiginte lian nomon. Ankaŭ ne laŭdu la bonecon de iu publikiginte lian nomon. Ne havu la koron de malamo nek malŝato al iu. Ne kontraŭdiru kontraŭ ĉiuj aŭdantoj, ĉar vi, bodhisatvoj, estas lernantoj de trankvila koro. Se iu demandus severe, ne klarigu al li per Hinajana Darmo, sed klarigu nur per Mahajano kaj havigu al li la originalan scion pri ĉio.”

Tiam la Budho, Bagavato, denove predikis por klarigi ĉi tiun signifon per jenaj versaĵoj:

- 27) Bodhisatvo prediku la Darmon
Ĉiam dezirante la trankvilon de la mondo.
Farinte la sidejon en pura loko,
Ŝnurinte oleon al sia korpo, foriginte ĉiujn malpuraĵojn,

- 28) Surmetinte novan veston, puriginte ekstere kaj interne,
Sidiĝu sur la sidejo de Darmo por prediki la Darmon.
- 29) Se jen estus tie bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj aŭ upasikoj,
Reĝo, reĝido, vasaloj aŭ urbanoj, prediku la
Darmon per profunda signifo kun ĝentila vizaĝo.
- 30) Se ili demandus severe, klarigu por ili laŭ signifo.
Por ili klarigu detale per la leĝo de kaŭzorezulto aŭ parabolo.
- 31) Per bona gvido instigu ilin
Kaj enirigu ilin pli kaj pli en la vojon de Budho.
- 32) Forigu maldiligentan kaj neglektan koron.
Prediku la Darmon kun amega koro disiĝinte el malgajeco.
- 33) Tage kaj nokte ĉiam prediku la plej superan vojon.
Ĝojigu ĉiujn klariginte per la leĝo de kaŭzo-rezulto kaj nekalkuleblaj paraboloj.
- 34) Se vi posedus vestojn, litaĵojn, manĝaĵojn kaj medikamentojn,
Ne domaĝu viajn ĉiujn aĵojn.
- 35) Nur deziru tion ke per ĉi tiuj predikoj
La vojo de Budho iam estos perfektigata kun ĉiuj vivaĵoj.
- 36) Se iu predikus ĉi tiun "Saddharm-Pundarika-Sutron" post mia forpaso,
Li forigos ĉiujn barojn de ĉagreno, t. e. ĵaluzo aŭ kolero.
- 37) Ankaŭ li forigos ĉian lamenton aŭ malgajon.
Li neniam estos mokita de homoj nek vundata de spado aŭ bastono.
- 38) Ankaŭ li neniam estos forpuŝata, ĉar li loĝadas trankvile en tolero.
Saĝulo ĉiam loĝas en trankvileco, ĉar li bone lernas trankviligi sian koron.
- 39) Eĉ se oni daŭre predikus per multaj paraboloj dum cent miliardoj da kalpoj,
Neniu povas laŭdi lian tutan bonfaron.

"Ankaŭ Manjuŝrio, en la tempo, kiam la Darmo estingiĝos, se Bodhisatvo-Mahasatvo dezirus lerni kaj reciti ĉi tiun sutron, ne havu la koron de ĵaluzo, nek flatado nek trompo. Ankaŭ ne malrespektu nek moku lernanton de la vojo de Budho kaj ne faru jen laŭdi nek jen mallaŭdi lin. Se jen estus bikŝuo, bikŝuino, upasako aŭ upasiko, kiuj dezirus ŝravakon, pratiekabudhon aŭ bodhisatvon, ne ĉagrenu nek havigu dubon dirante 'Vi estas tre malproksime el la vojo. Fine vi ne povus akiri la originalan scion pri ĉio, ĉar vi estas malatenta kaj neglekta je la vojo.' Ne disputu pri ĉiuj darmoj nek konkuru vane. Ho ve, pensu vin la granda amulo al ĉiuj vivaĵoj. Pensu ĉiun Tathagaton via amega patro. Pensu ĉiun bodhisatvon via granda instruisto. Vi estimu kaj adoru ĉiun bodhisatvon en dek direktoj kun profunda koro. Egale prediku la Darmon al ĉiuj vivaĵoj. Ne prediku la Darmon tro multe nek tro malmulte, ĉar vi estas tiu, kiu obeas al la Darmo. Ankaŭ ne prediku multe al tiu, kiu amas profunde la Darmon."

"Manjuŝri, en la lasta tempo, kiam la Darmo estingiĝos, Bodhisatvo-Mahasatvo, kiu kompletigis ĉi tiun trian trankvilan agadon, estos malordigata de neniu, ĉar kiam li predikos ĉi tiun sutron, tiam li povos akiri bonan amikon, kaj li kune lernos ĉi tiun Darmon kaj kune recitos ĉi tiun sutron. Ankaŭ li povos akiri multe da homoj kiel siajn amikojn, kiuj alveninte aŭdos ĉi tiun Darmon, tenos ĝin, tenante ĝin recitos bone, recitante ĝin predikos bone, predikante ĝin skribos bone, aŭ skribigos, regalos, respektos kaj laŭdos la sutron."

Tiam la Budho, Bagavato, denove predikis por klarigi ĉi tiun signifon per jenaj versaĵoj:

- 40) Tiu, kiu volas prediki ĉi tiun sutron,
Forlasu la koron de ĵaluzo, kolero, aroganteco,
Flatado, trompo kaj mensogo. Agadu ĉiam honeste.
- 41) Ne malestimu aliulon nek disputu pri la Darmono.
Havigu estimecan koron al aliulo kaj ne diru al li,
"Vi ne povas akiri Budhecon."
- 42) Se ĉi tiu Budha knabo predikus la Darmon,
Estu ĝentila, toleru kaj kompatu al ĉiuj.
Ne havu la koron neglektan.
- 43) Al la Mahasatvo en dek direktoj, kiu agadas laŭ prava Darmono pro sia kompatato,
Akceptu kun estima koro pensante, "Ĉi tiu estas mia granda gvidanto."
- 44) Al ĉiuj budhoj kaj bodhisatvoj havu la koron jene:
"Ĉi tiuj estas miaj plej superaj patroj."
Detruu vian arogantan koron
Kaj forigu ĉiujn barojn por prediki la Darmon.
- 45) Ĉi tiu estas la tria Darmono. Vi, saĝulo, protektu ĉi tion!
Se vi agadus elkore laŭ ĉi tiu Darmono,
Nekalkuleblaj homoj estimus vin!"

"Ankaŭ Manĵuŝri, Bodhisatvo-Mahasatvo, kiu en la lasta tempo, kiam la Darmono estingiĝos, tenas ĉi tiun sutron Saddharma-Pundarikon, en laikuloj kaj sanganoj, havu la koron de granda kompatato en ĉiuj nebodhisatvaj homoj kaj havu la koron de granda lamento, pripensu jenajn: "Ĉi tiuj homoj perdas la predikon laŭ lerta rimedo de la Budho. Ili neniam aŭdas ĉi tiun predikon nek scias nek konvinkiĝas nek demandas nek kredas kaj nek komprenas. Eĉ se ĉi tiu homo nun ne kredas nek komprenas ĉi tiun sutron, kiam mi akiras la plej superan vekigecon, tiam mi bone gvidos lin en ĉi tiun Darmon per mirinda povo kaj scipovo, kie ajn loĝadas li."

"Manĵuŝri, tiu ĉi Bodhisatvo-Mahasatvo, kiu kompletigos ĉi tiun kvaran Darmon post forpaso de Tatahagato, havos nenian eraron, kiam li predikos ĉi tiun Darmon. Li ĉiam estos regalita, estimata, alte taksata kaj laŭdata de bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj, upasikoj, reĝoj, reĝidoj, vasaloj, popoloj, brahmanoj kaj lajkuloj. Ĉieluloj en la aero ĉiam alvenos al li por aŭskulti la Darmon. Kiam li estas en vilaĝo aŭ kastelo aŭ trankvila loko aŭ arbaro, tiam se iu venus al li por riproĉi lin, ĉieluloj protektus lin tage kaj nokte kaj ĉiuj aŭskultantoj ĝojegos, ĉar ĉi tiu sutro estas protektata de la potenco de ĉiuj budhoj en estonto, estinto kaj estanto."

"Manĵuŝri, en nekalkuleblaj landoj estas tre malfacile eĉ aŭdi la nomon de tiu ĉi Saddharma-Pundarika-Sutro. Des pli malfacile estas ke ni vidas, tenas kaj recitas la sutron. Manĵuŝri, ekzemple potenca ĉakravarta reĝo, kiu projektas konkeri najbarajn landojn, kolektinte diversajn soldatojn atakas ĉiujn malgrandajn reĝojn, kiuj ne obeas lian ordonon. Tiam la reĝo donacas kiel rekompentecon rizejon, loĝejon, vilaĝon, kastelon, ornamaĵon, diversajn trezorojn, oron, arĝenton, lazurŝtonon, tridaknon, agaton, koralon, sukconon, elefanton, ĉevalon, veturilon, serviston aŭ popolamason al ĉiuj, kiuj estas meritaj en la batalo, sed tamen li neniam donas la helan gemon, kiu estas en lia hartufo, ĉar nur la reĝo

havas ĉi tiun gemon sur sia kapo. Se li donus ĉi tiun gemon al iu, ĉiuj parencoj de la reĝo surpriziĝus kaj mirus. Manĵuŝri, Tatahagato estas tiel same kiel la reĝo. Li gajninte la landon de Darmo fariĝis la reĝo de tri mondoj per la potenco de djano kaj scio. Ĉiuj saĝaj kaj sanktaj generaloj de Tathagato batalis kontraŭ reĝoj de diabloj, ĉar la reĝoj ne obeas. Predikinte multajn sutrojn ĝojigas ĉiujn, kiuj estas meritaj. Li donacis djanon, liberiĝon, seniluziecan, radikon aŭ forton, t.e. havaĵojn de Darmo. Ankaŭ donacis al ili la kastelon de Nirvano dirante, 'Vi gajnis la liberiĝon.' Li gvidis kaj ĵojigis ilin, sed Li neniam predikis ĉi tiun Saddharma-Pundarika-Sutron. Manĵuŝri, eĉ se iu soldato estas grande merita, ĉakravarta reĝo neniam donacas sian nekalkuleblan gemon, kiu estis longe en sia hartufo. Sed tamen li finfine donacas ĉi tiun gemon al ĉiuj. Nun Tathagato, la reĝo de Darmo en tri mondo, instruas ĉiujn vivaĵojn per ĉi tiu Darmo. Batalante kontraŭ diablo de kvin elementoj⁶, diablo de pasioj kaj diablo de morto, la saĝaj kaj sanktaj generaloj estis grande meritaj kaj estingis tri venenojn, liberiĝis el tri mondoj. Tiam Tathagato ĝojegas kaj nun predikas ĉi tiun Saddharma-Pundarika-Sutron, kiu kapablas atingigi ĉiujn vivaĵojn al la scio pri ĉio. Tathagato neniam predikis ĝis nun ĉi tiun, ĉar jen estas multe da malamikoj en la mondo, kaj ĉi tiu Darmo estas nekredebla. Manĵuŝri, ĉi tiu Saddharma-Pundarika-Sutro estas la unua prediko de ĉiuj budhoj kaj plej profunda el ĉiuj predikoj. Li donacas ĉi tiun plej laste, kvazaŭ la potenca reĝo donacas laste sian gemon, kiun li protektis longe. Manĵuŝri, ĝis nun mi longe protektis ĉi tiun sutron kaj neniam predikis, ĉar ĉi tiu estas sekreta tenejo de ĉiuj budhoj kaj ĉe la plej alta loko en ĉiuj sutroj. Hodiaŭ mi klarigas por la unua fojo ĉi tiun."

Tiam la Budho, Bagavato, denove predikis por klarigi ĉi tiun signifon per jenaj versaĵoj:

46) Ĉiam estu tolerema! Kompatu ĉiujn.

Kaj disvastigu la instruon, kiun la Budho laŭdas.

47) Fine de lasta tempo tiu, kiu tenos ĉi tiun sutron,

Kompatu ĉiujn, kiuj estas hejmuloj, senhejmuloj aŭ bodhisatvoj,

48) Ĉi tiuj neniam aŭdis, nek kredis ĉi tiun sutron.

Tial ili ĉiuj perdis grandan profiton.

49) Se mi akirus la vojon de Budho,

Per diversaj lertaj rimedoj mi predikus ĉi tiun Darmon

Kaj enirigus ilin en la Darmo.

50) Ekzemple potenca ĉakravarta reĝo donacas

51) Elefanton, ĉevalon, veturilon kaj ornamaĵon,

serviston kaj riĉaĵon al la soldato,

52) Kiu estis merita por la batalo.

53) Se iu estus kuraĝa kaj farus malfacilaĵon,

La reĝo donacus al li sian gemon, kiu estas en sia hartufo.

54) Ankaŭ Tathagato, havanto de granda forto de tolereco kaj trezoroj de scio,

Instruas ĉiujn laŭ Darmo kun granda amo.

⁶ diablo de kvin elementoj, diablo de pasioj kaj diablo de mortoj, 五蘊魔, 煩惱魔, 死魔. Estas esprimata metafore per diablo kiel estas terura, la kvin elementoj, pasioj kaj morto. Pri kvin elemento vidu la piednoton 12 de la tria ĉapitro.

- 55) Mi vidas tion ke ĉiuj deziras liberiĝi el suferoj
Kaj bataladas kontraŭ multaj diabloj.
- 56) Por ĉi tiuj vivaĵoj mi predikis diversajn Darmojn.
Mi predikis ĉi tiujn sutrojn per granda lerta rimedo.
- 57) Sciinte ke ĉiuj vivaĵoj jam akiris la forton
Laste mi predikas ĉi tiun Saddharma-Pundarika-Sutron.
- 58) Ĉi tio estas egale al tio,
Ke la reĝo fine donacas sian helan gemon en la hartufo.
- 59) Mi ĉiam protektis ĉi tiun sutron kaj neniam predikis ĝin,
Ĉar la sutro estas tre valora kaj plej supera en multaj sutroj.
- 60) Sed mi predikas ĉi tiun sutron por vi,
Ĉar nun estas vere ĝusta tempo.
- 61) Post mia forpaso tiu, kiu volas iri en la vojon de Budho
Kaj prediki ĉi tiun sutron, amikiĝu al tiaj kvar Darmoj.
- 62) Tiu, kiu legos ĉi tiun sutron, neniam estos malgaja nek dolorigita de malsano,
Koloro de lia vizaĝo estos ĉiam klare blanka,
Kaj li ne estos denaske malriĉa, nek malaltranga, nek malbela.
- 63) Ĉiuj vivaĵoj deziros vidi lin kvazaŭ oni sopiras saĝulon aŭ sanktulon.
Ĉielaj knaboj ĉiam servados al li.
- 64) Neniu povos vundi lin per glavo aŭ bastono.
Neniu povos difekti lin per veneno.
Se iu mokus ĉi tiun, lia buŝo tuj estos fermita.
- 65) Li traĭros sentime kvazaŭ reĝo de leono paŝas.
Lumo de lia scio lumos kvazaŭ la suno.
- 66) Li ĉiam sonĝos nur belege. Ekzemple iam li sonĝos:
"Multaj budhoj sidiĝas sur siaj sidejoj.
Multaj bikŝuoj ĉirkaŭas lin kaj estas aŭskultanta liajn predikojn."
- 67) Ankaŭ iam li sonĝos:
"Li mem predikas la Darmon por nagoj kaj asuroj,
Kies nombro estas egala al tiu de la sabloj de Ganga.
Ili ĉiuj respektas lin kun interplektitaj manoj."
- 68) Ankaŭ iam li sonĝos:
"Multaj budhoj, kies korpo estas orkolora,
Radias nekalkuleblajn lumojn, lumigas ĉiujn vivaĵojn,
Kaj predikas Darmojn per la voĉo de Brahmo."
- 69) La Budho predikas la plej superan Darmon por kvar anoj.
Li estas laŭdanta la Budhon kun interplektitaj manoj.
Li aŭskultas la Darmon, ĝojegas, regalas, akiras daranion
Kaj komprenas la nedegeneran scion.
- 70) La Budho sciinte ke li eniris en la vojon de Budho
Antaŭdiras ke li certe atingos la plej superan vekiĝecon.
- 71) La Budho diras, "En venonta mondo vi, bona knabo, akiros
La grandan vojon de Budho kun nekalkuleblaj scioj.
- 72) Via lando estas purega kaj grandioza kaj ĉiuj de kvar aroj
Aŭskultos vian predikon kun interplektitaj manoj."

- 73) Ankaŭ iam li songôos:
“En arbaro li mem lernas bonan Darmon, komprenas la veron de ĉiuj Darmoj,
Eniras profunde en djanon kaj vidas ĉiujn budhojn, kiuj havas dek povojn en dek direktoj.”
- 74) Ĉiam li songôos tiel bone:
“Li aŭskultas la Darmon de budhoj, kies korpoj estas orkoloraj kaj ornamitaj de cent feliĉaj figuroj,
Poste li predikas la Darmon por ĉiuj.”
- 75) Ankaŭ li songôos jenajn:
“Li fariĝas reĝo, sed post nelonge li forigos siajn palacon kaj parencon kaj sidiĝas sur la leona sidejo,
Sub la bodiarbo li akiros la scion de budhoj
Kaj atingos al la plej supera vojo.
- 76) Poste li turnas Darmaĉakron kaj predikas la Darmon
Por kvar aroj dum dekmil cent milionoj da kalpoj.
- 77) Predikante bonan puregan Darmon li savas nekalkuleblajn vivaĵojn.
Poste li eniras en Nirvanon kvazaŭ la lumo de lampo estingiĝas kun fumo.
- 78) Se li predikus ĉi tiun unuan Darmon en estonta malbona mondo,
Li akirus la profiton tiel grandan kiel supre-diritaj bonfaroj.”